**Raporto – Akvo por Kalima (D.R. Kongo) – 4a projekto**

**2018-03-21**

Bonvolu vidi la gheneralajn informojn pri la situacio pri trinkakvo en Kalima en la pli fruaj raportoj.

Intertempe ni sukcesis jenaj pashoj :
1. 2013, per 3 mil Euro : malsanulejo kaj ch. 100 familioj.
2. 2014/15, per 10 mil Euro : du kranaroj por ch. 3000 homoj.
3. 2015/16, per 11 mil Euro : du kranaroj por ch. 6000 homoj.

Ni dankas al la jenaj subtenantoj :
13 mil Euro de WKV AG, Gutach, Germanio
4 mil de Stichting for Internationale Komunikatie (Ans kaj Hans Bakker), Nederlando
2 mil de Stiftung Brücke, Emmendingen, Germanio
5 mil de pluraj kolektoj inter esperantistoj.

4a projekto 2017/18 por ch. 5000 homoj, tuta subteno 10.185 Euro, plejparte (8.677 Euro) de la germana firmao Wasserkraft Volk AG, WKV AG

**Koran dankon al chiuj subtenantoj !**

Akvo denove de la fonto Omari Chami, je la piedoj de la Abuki-montaro. Ghi estas filtrata per sablo-tavolo, kaj disinfektita pere de kloro. Ghi provizas la kvartalojn Kalima C, Camp des Appointes kaj parton de Cite Bobela.
Surlokaj libervoluloj faris la manlaborojn kiel fosi kaj transporti ; ili ricevis manghajhojn kaj salajreton el la surloka organizanto agriklutura PIEADC, kies estro Etienne zorgis por la organizado. La bazajn laborojn faris lokaj libervoluloj (transporti la materialon kaj fosi por la tuboj entute 2,1 km).
Ili konstruis 2 kranarojn – nomumitaj lau la plej granda subtenanto: WKV kaj Manfred Volk.


Estonte - Projekto 5 (Abuki)
Por provizi la aliajn 60.000 homojn en Kalima per bona trinkakvo necesas preni akvon el montara rivereto (au granda rojo) 300 m super la urbo. La kostoj entute : 45.000 Euro – en du pashoj.
Ni esperas ricevi subtenon de fonduso de la germana ministerio pri evolua kunlaboro. Tamen mankas 20 mil. Ni esperas denove subtenon de firmao(j) kaj de niaj esperantistaj samideanoj.

Projekt-Adreso (en la franca au en Esperanto):
PIEADC, c/o Etienne Katchelewa Kandolo,
Avenuo Kamisuku II, Quartier Munyange,
Kalima, Distrikt Pangi/Maniema/RD Kongo.

E-mail: pieadc2006@yahoo.fr , www.kamparanasolidareco.weebly.com , Tel. +243 990428340.

**D-ro Manfred Westermayer (Asocio de Verduloj Esperantistaj, Esperanto-Friburgo)**
Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen
e-mail : manfred@westermayer.de
Te. +49-761-584854
AVE: www.verduloj.org/afriko.htm ( > diversaj informoj kaj raportoj)
UEA-Konto : avex-z

Fotoj pri Akvo por Kalima – projekto 4

| | |
|---|---|
|  |  |
| Krano-duopo  Manfred Volk | Krano-duopo Wasserkraft Volk |
|  | <br><br>Mapo de la konstruitaj kranaroj – sube Wasserkraft Volk kaj Manfred Volk |
| 2018/19 : Montara rivereto/rojo Abuki | |